Tiuj klasoj ekos lernadon en septembro 1994 je la oficiala lern-horaro. La direktorino klopodos apud siaj lingvo-instruistoj, por ke almenaŭ unu studu E-on perkoresponde kaj per staĝo dum la ferioj. (Ni sekvos la aferon el la proksimeco!).

Estas notinde, ke la privataj lernejoj nin ricevis pli atenteme ol la publikaj.

Armand HUBERT

BETSCHDORF =====

La 2an kaj 3an de oktobro okazis en Betschdorf esperanto-ekspozicio en la kadro de la "salono de la libertempo" -Hobbythèque-.

La stando estis bonfrekventita. Multaj informoj, klarigoj estis disdonitaj dank' al Sinjoroj LUDWIG, ROUX kaj ECKERT (el Germanio). Dankon al ĉiuj pro la senmezura helpo alportita al tiu sukceso.

Tiuokaze estis organizita "Esperanto-konkurso", al kiuj 10 personoj partoprenis, ĉefe infanoj. La premio estis aliĝo al la "perkoresponda kurso". La laŭreato estas Sinjoro Eric MARZOLF, studento pri matematiko en la universitato de Mulhouse.

Li ricevis oficiale sian "aliĝilon" la 23an de oktobro en la muzeo de Betschdorf. Ĉeestis pluraj eminentuloj kaj Gesinjoroj CANCEL el Colmar. La du plej junaj lernantinoj gratulis la laŭreatojn per kelkaj vortoj. La ceremonio finiĝis per honor-vino kaj kuloj*.

* P.S. - Noto de la redaktoro: kvankam estas malpermesate al serioza tajpist(in)o ŝanĝi iun ionon al teksto pritraktata... mi atentigas nian legantaron pri skeptikemo mia: Ĉu vere tiuj etaj insektoj dronis en la honor-vin-glasoj de la gastoj?... Hum! Ĉar mi konas la talenton de Odette por ellabori frandigajn kukojn, mi supozas, ke ŝi iĝis viktimo de iu malica koboldo..., dum ŝi tajpis sian raporton!



BAR-le-DUC =====

Spite al okulfrapa gazetkomuniko, disaŭdigo far loka radiosendilo, afiŝoj... neniu interesato prezentiĝis je la fiksita dato por aliĝi al la la-grada kurso. Tri personoj emus daŭrigi sian studadon de la 2a-grada.

il vient de sa russie natale ...
il compose ...
il joue de la guitare !
**il interprète
ses chansons**



**Mihael
BRONSTEIN**

vous invite au Centre
Socio-Culturel
de
MARBOT - HINOT
9, rue de la chapelle
BAR-le-DUC

jeudi 25 novembre
à 20h30

Ni kompanse notu la grandan intereson de la 14 staĝanoj (Institut des Forces de Vente 55), kiuj diligente laboras sub la gvidado de nia klub-sekretario, F.-X. Gilbert.

La klubo akceptis Mikaelo-n BRONSTEIN, ĵaŭdon la 25an de novembro antaŭ 15 ĉeestantoj, ĉiuj esperantofojoj. Ekstera publiko ja ne interesiĝis kvankam aperis gazetartikolo kaj kvankam disdoniĝis afiŝoj kaj disdoniĝis 80 personaj invitiloj. Mikaelo estis gastigata de Anne Amblès. Kelkaj samideanoj partoprenis la kutiman vespermanĝon kun nia "esperanto-konsulo", kiu alveturis Mulhouse la morgaŭon, antaŭ ol rapide flugi al sia hejmo-urbo TIHVIN (apud St-Peterburg).

La jara Zamenhof-vespero okazos sabaton, la 29an de januaro en la Kultur-Centro Marbot. Tutcerte regos tiam la tutamika etoso, kiun ĝuis la 31 partoprenantoj de la aŭto-radio, pri kiu raportas aliloke (franclingve... kaj en esperanto!) "La Informilo".

===== DANKON AL NIA RUSA GASTO... =====

MULHOUSE-ESPERANTO havis la honoron gastigi sia-vice preleg-vojaĝanton Mikaelo Bronŝtejn el la rusa urbo Tihvin je 200 km de Sankt-Peterburgo. La preleg-vojaĝo estis organizita de LIFE kun partopreno de 11 grupoj, kiujn li vizitis traveturante tutan Francion. La 26-an de novembro estis lia lasta etapo en nia urbo.

En la kadro de la trilandaj aranĝoj ankaŭ MULHOUSE-ESPERANTO deziris organizi sian "VET-on" (VESPERO ESPERANTA TRILANDA), post Colmar kaj Frajburgo kaj antaŭ Bazelo (venonta Zamenhof-festo). La vizito de Mikaelo Bronŝtejn estis la taŭga okazo por tia aranĝo. En aparta salono de la restoracio "Au Cheval Blanc" en Baldersheim iom norde de Mulhouse estis organizita la preleg-vespero de nia gasto. Ĝin partoprenis ankaŭ gesamideanoj el la najbaraj urboj, Colmar, Montbéliard kaj Frajburgo. Bedaŭrinde neniuj povis veni el la svisa urbo Bazelo. Al komencantoj prizorgis la samtempan tradukon Edmond Ludwig.

Mikaelo Bronŝtejn mem prezentis sin al la publiko, parole, kante kaj gitare. Li nuntempe loĝas en la urbo Tihvin, kie li laboras kiel elektro-inĝeniero en fabriko pri plastaj varoj. Antaŭe li loĝis en la urbo Vorkuta norde de la polusa cirklo. Tie li samfakte laboris en karbo-minejo, kie salajroj estas multe pli altaj. En tiu norda urbo la vintro daŭras 10 monatojn kun tutmonata nokto en decembro/januaro. Neĝo ekaperas jam fine de aŭgusto kaj restas ĝis junio, tiam ĝi rapide degelas, eble en nur tri tagoj pro daŭra sunbrilo.

Al li estis starigitaj demandoj pri la naciecoj en Rusio. Efektive al francoj estas malfacile fari distingon inter nacieco, ŝtataneco kaj lando. Tielli klarigis, ke

ekzistas multaj etnoj ofte dissemataj en tuta ekssovetunio. Etnoj kun komunaj teritorioj iĝas nacioj, kaj nacioj povas fariĝi respublikoj, kaj laŭ la grandeco, eĉ aŭtonomaj kun eventualaj postuloj iĝi sendependaj.

Mikaelo Bronŝtejn ankaŭ klarigis pri la ekonomia situacio en sia lando, diversaj enspezoj, kostoj de varoj sed kun grandega inflacio. En tri jaroj la prezoj de varoj milobloĝis sed salajroj nur tricentobloĝis, el tio rezultas granda perdo de aĉeto-povo. Konklude al tio li kantis kvazaŭ karikature "Kiel li kun Elcin plantis terpomojn" (por kompensi tiun perdon).

La Esperanto-movado suferis pro diversaj malfacilaĵoj, kiujn la sinsekvaj registaroj starigis kontraŭ Esperanto. Malrekomendo uzi la vorton *Esperanto*, malpermeso ĝin instrui aŭ eldoni lerno-librojn aŭ vortarojn, subitaj malpermesoj organizi tendaron. Tamen la Esperantistoj ofte eltrovis ruzaĵojn por kontraŭi tiujn malpermesojn, oni uzi la vorton *Internacia Lingvo*. Nun la movado estas pli libera kaj la nova eldonejo "Impeto" povas eldoni siajn proprajn verkojn. Por la 200-a datreveno, en 1999, de naskiĝo de la fama poeto Puŝkin, ĝi planas eldoni en Esperanto 2-voluman tradukon de lia verkaro.

Certe restas multe por ekscii pri tiu vasta lando, tial li invitis nin viziti Sankt-Peterburgon, la urbon de la caroj, de Petro la granda kaj lian nunan hejmurbon Tihvin.

La vespero finiĝis per agrabla kaj amika vespermanĝo en la restoracio-mem. Jam en la sama nokto nia gasto forveturis al Parizo por kelkajn horojn poste forflugi al Sankt-Peterburgo.

Dankon Mikaelo, ĝis revido ie en Esperantio.

ni plezure partoprenis!



le plaisir de participer!

ĈU VI JAM AŬTO-RALIUMIS?... =====

Mirinda okazaĵo... La vetero estis belega la dimanĉon 19an de septembro, kiam ni atingis la rendevuejon en **Pagny-sur-Meuse** (kaj ĝi restis belega dum la tuta tago!).

F X G ... (ĉu kodnomo de spiono, kiel 007??) asertis al ni, ke estis tiel, ĉar li bone preĝis. Do, se iam vi bezonos intervenon de iu sanktulo en via privata vivo (ĉu por ĝui belan veteron dum ferioj, aŭ por retrovi vian bopatrinoŝan perditan en luzerno-kampo) vi turnu vin al FXG, kiu, krom liverado de tutmondaj korespondantoj, povos ankaŭ (nur se vi petos tion tre ĝentile) interveni por vi al la ĉielaj instancoj, kie li ŝajnas tre efika. Alidire "...Mi povas ĉiele provi kortuŝi la ĉielon...".

Nu, Pri kio mi volis paroli al vi? Ha, jes!... pri la ralio! Do partoprenis 33 personoj en 10 aŭtomobiloj. Ne estis eble egaligi la veturantojn en ĉiu veturilo (3 komo 3... neniu konsentis dividiĝi). Ni ricevis iom hermetikan demandaron, kiun finfine ni sukcesis plenumi... pere de helpo de la tiea loĝantaro (cetero tre afabla kaj helpema!)... Sed tamen mi komprenis, kial, iam, Nancianoj perdiĝis kaj retroviĝis en la Norda Maro! Ni tiel atingis urbeton, kie oni donis al

ni 2an demandaron, kaj tiel plu.

Laŭ turisma vidpunkto ni vidis interesajn aĵojn: **Euville**, rimarkinda urbeto kun belegaj urbodomo kaj preĝejo... Apude ni povis "admiri" la ŝtonminejon, kie naskiĝis la ŝtonoj, kiuj pavimas parton de nia ĝardeno. Poste, **Commercy**, kaj fine **St-Mihiel**. Post Commercy, post pluraj horoj da raliado, mi-mem estis laca kaj komencis neglekti respondi ĉiujn demandojn...

Entute ni vizitis diversajn urbojn, vilaĝojn kaj ĉefe ŝtonminejojn kaj uzinojn. Pikniko okazis en St-Mihiel apud rivero Mozo tre bela tiuloke.

Entute, agrabla tago kun simpatia etoso. La 2 gajnintojn de la ralio oni premiis per aliĝo al la perkoresponda kurso (pagita de la Bara grupo). Ni vidis interesajn vidindaĵojn sed mi-mem ne tre interesiĝas pri la nomoj de posedantoj de ŝtonminejoj, fabrikoj, ks. La solvo de la enigmo estis verŝajne pli facila por loĝantoj de Mozo. Oni donis al ni folion kun la solvoj al la demandoj. Sed tiam... ni estis redonintaj la demandarojn... Laŭ mia memoro, ŝajnas al mi, ke Ludoviko la Dekvina estis la feraĵisto (de Commercy kaj de Placo Stanislas en Nancy), Emmanuelo Héré, reĝo de Francio kaj Jean Lamour lia bopatro...

Ĉu vi hazarde flustras, ke estas ie eraro?...

Jean-Paul COLNOT

*Adieu Meuse endormeuse et douce à mon enfance
tu demeures aux prés où tu coules tout bas
Meuse adieu... j'ai déjà commencé ma partance
en des pays nouveaux où tu ne coules pas!*

Charles PEGUY - Les adieux de Jeanne...

N.B. - Ĉu troviĝas inter nia legantaro, iu(j) poet(in)o(j), kiu emus traduki la ĉi-supran strofon? Ni ne prepruvu, ke esperanto plene taŭgas por esprimi ritmon, harmonion, muzikon de iuj ajn versoj, fidelante al la propraj sentoj de l' aŭtoro.

Ni publikigos la ricevitaĵojn "verkojn" en nia bulteno.

MEMORINDA STAĜO!... =====

La 16/17ajn de oktobro 1993 okazis en MITTELWIHR la 36a staĝo de "Esperanto Parolata" de nia Orienta Federacio. Krom la kutimaj programeroj, 4 diversnivelaĵoj aŭ prelegoj, ĉi-tiu staĝo havis apartan karakteron. Ni povis interalie admiri la talenton, la labor-kapablon, la dinamikon kaj la kreivecon de niaj samideanoj el COLMAR. Ne nur ili mirinde organizis tiun staĝon en aparte taŭga kulturo-centro en Mittelwih, sed krome ili kreis novan fakan asocion, nome "TAKE-ESPERANTO" (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj). La fondiĝo de tiu asocio ne estas nur sur-papera, sed jam eblis vidi surloke kaj vere konstati iliajn unuajn realigojn:

1 = Nova profesi-nivela **Esperanto-budo**, facile muntebla, el tuboj, kun la indiko TAKE-ESPERANTO.

Ni esperas, ke MULHOUSE-ESPERANTO havos la privilegion povi uzi tiun budon okaze de "Forumo de Asocioj" okazonta la 22/23ajn de januaro 1994. Tiam ni fieros pri la realigo de TAKE-E° kaj momente antaŭdankas la skipon de Colmar.

2 = Kolora turisma prospekto en esperanto pri Mittelwih kaj pri tuta Alzaco.

3 = Eldono de faka revuo "La Domo-Jarcento 21", kiu direktiĝas ne nur al fakuloj pri konstruado, sed al divers-tipaj fakuloj ĝi deziras montri la

vojon, kiel uzi esperanton per siaj enketoj kaj analizoj. Jam abundas en ĝi diversaj komercaj anoncetoj, kiuj montras la seriozecon de la revuo.

Mittelwih estas fakte la loko por montri la kapablon de fak-asocioj, ĝuste pro tio, nia samideano **Maurice SCHLEWITZ** prezentis al ĉiuj staĝanoj kiel funkcias radio-amatora stacio, kiel li tiamaniere povas uzi esperanton ĉiu-tage,

ĉar esperanto estas multe uzata inter radio-amatoroj el multaj landoj. Maurice estas membro de de ILERA (Internacia Ligo de Radio-Amatoroj), vic-prezidanto de radio-amatoroj TRAM (en Mulhouse) kaj vic-prezidanto de GEPRAF (Grupo de Esperanto Parolantaj Radio-Amatoroj Francaj).

Krom la voĉa komunikado, tiu asocio ankaŭ kreis komputoran leterkeston, nomata paket-radio, kiu uzas la ondojn de radio-amatoroj por sendi skribajn mesaĝojn. Take-Esperanto tiam profitis la okazon tiel sendi mesaĝon al 26 radio-amatoroj en 18 landoj. Intertempe jam venis respondo el Francio, Germanio, kaj tre varmaj salutoj kaj kortuŝa mesaĝo el malvarma Finnlando. Ni gratulas al Maurice pro tiuj atingoj; li montras al ni kiel kombini du hobiojn, kaj ke esperanto estas alimaniere uzebla dank' al fak-asocioj.

A. GROSSMANN



ESPERANTO-MOVADO EN RUMANIO NE FERIIS!... =====

Pasintan someron, fervoraj rumanaĵ esperantistoj intense agis por organizi du gravajn eventojn.

La 3an de julio, en la vilaĝo Vintu de Jos (Vincu de Ŝos), distrikto Alba, ĉe la romkatolika paroĥejo, okazis la 2a renkontiĝo de la rumanaĵ I.K.U.E.-anoj. Partoprenis 40 personoj el Alba, Baia Nare, Brasov, Sibiu, Timisoara, Targu-Mures, k.a., inter kiuj pastro Lajos Kobor el Hungario, vicprezidanto de IKUE, kaj F-ino Aurora Bute, sekretariino de la Rumana Esperanto-Asocio.

La temo de la renkontiĝo estis: "Ekumenismo kaj Esperantismo", pri kiu parolis Vasile Albu. La renkontiĝo komencis en la preĝejo, kie tri romkatolikaj pastroj - D. Teleky, L. Kobor kaj Z. Vizi, esperant-lingve, celebris la Sanktan Meson kaj belege predikis. Poste, en la fama kaj luksa domo "Pongracz" apud la preĝejo, kie estis gastigitaj la partoprenantoj, havis lokon la kunveno. Oni elektis novan estraron, kies prezidanto estas Nikolao Rodean el Sibiu.

Dank' al pasintjara monhelpo de la paroĥanoj de S-ro Duilio Magnani (el Rimini (Italio)), al ĉiuj partoprenantoj estis pagitaj la veturado, loĝado, kaj manĝaĵo. Bedaŭrinde, la plej granda rumana grupo de IKUE, tiu de la urbo Oradea, rifuzis ĉe-esti pro la ŝanĝiĝo de la dato (la 3a anstataŭ la 1a de julio) kaj de la loko (Vintu de Jos anstataŭ Alba Iulia, kiu estas fervoja nodo, 10km-ojn sude de Alba Iulia) sangigo farita unu monaton pli antaŭe pro la inflacio, la tre grandaj hotel- kaj restoraci-prezroj en Alba Iulia.

La dua evento okazis la 22an de aŭgusto, en la urbo Sibiu, kie antaŭ pli ol sepdek jaroj, la fama esperantologo Andreo Cseh ellaboris sian ne malpli faman instruometodon. Tie, en universitata kursoĉambro, havis lokon la reorganiza kunveno de la "A.I.S.-Rumanio"*. Partoprenis 28 personoj, universitataj kadroj, studentoj kaj esperantistoj de la urbo, inter kiuj S-ro D-ro Helmar Frank, prezidanto de AIS-San Marino, kaj aliaj lokaj AIS-anoj. Ĉi-okaze la Rumana filio de AIS, fondita la 11an de oktobro 1990, estis reorganizita sub la nomo de "Asocio Internacia de la Sciencoj" (mallonge AIS-Rumanio), kiu estas legalizota kaj poste aligos al AIS-San Marino.

F-ino Sara Reisenauer, sekretariino de la provizora komitato de AIS-Rumanio, legis la statutaron de la asocio, kiu, post diskutoj, estis aprobita far la partoprenantoj. Je la fino, S-ro D-ro H. Frank detale prezentis la celojn, la necesajn venontajn agadojn de la reorganizita -baldaŭ legalizita- AIS-Rumanio, al kiu li bondeziris sukcesojn.

Sibiu, septembro 1993 - Vasile ALBU

* IKUE: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
AIS: Asocio Internacia de la Sciencoj

Fak-delegito de UEA
Vic-direktoro de AIS-Rum^o
Landa reprezentanto de IKUE por Rumanio

Noto de la redakt.: Vasile ALBU havas de pluraj jaroj amikajn rilatojn kun klubanoj de BAR-le-DUC

kaleidoskopo de tout... un peu



SALUT!

Je m'appelle MEVA
Je suis née
le 24 septembre 1993 à 1h15mn.
Je suis la fille
d'Evelyne et de Roland
et la petite soeur
de Violaine et d'Anne-Claire
Ecrivez-moi!...

Méva CUENOT

35, Rue de Villers
F - 25700 VALENTIGNEY
Tél.: 81 34 64 46

*** NASKIĜO ***



SALUTON!

Mi nomiĝas MEVA
Mi naskiĝis
la 24an de septembro je la 1a15
Mi estas la filino
de Evlin' kaj de Rolando
kaj la fratinetto
de Vjolen' kaj de An' Kler'
Skribu al mi!

La tuta legantaro
de "La INFORMILO"
bondeziras pleniĝojan vivon
al la freŝbakita "bubetino"!

Esperanta PEN-Centro en la tutmonda PEN-Klubo

En la n-ro 14 (1881) de la 6-a de novembro ni aperigis mal-longan informon pri la akcepto de la Esperanta PEN-Centro en la tutmondan PEN-Klubon. D-ro Giorgio Silfer estis la oficiala observanto de la Esperanta PEN-Centro, kune kun sia edzino Perla Martinelli, ĉefredaktoro de "Literatura Foiro", dum la 60-a Mondkongreso de PEN-Klubo en Santiago de Kompostelo (Hispanio).

D-ro Silfer, ni gratulas vin. Kiel disvolviĝis la afero en Santiago?

La ĝenerala asembleo akceptis nian centron per granda plimulto, pli granda ol por la eksjugoslavio kaj por la bosnio, sed ne unuanime, kiel por la kazako kaj la kimra. Tio signifas, ke okazis sufiĉe longa debato (duonhora) kaj eĉ en malfacilaj cirkonstancoj, ĉar ne funkciis la samtempa interpretado, kaj mi devis mem prezenti miajn argumentojn. Sed fine ĉiuj demandoj estis responditaj, kaj nur kvar delegitoj voĉdonis kontraŭ (inter ili la japana kaj la angla).

Kiujn problemojn vi renkontis?

La estraro de PEN Internacia estis tre lojala rilate al nia peto, kaj la prezidanto (György Konrad, hungaro) esprimis sin favore. Iaŭ promeso farita pli frue al nia prezidanto, István Nemere. Aparte dankindaj estas ankaŭ la tri delegitoj, skota, svisitala kaj finna, kiuj subtenis formale nian kandidatigon. La problemoj estis esence tri: la malbona memoro ĉe kelkaj delegitoj pri antaŭaj kontaktoj fare de aliaj esperantistoj, la demando, ĉu vere ni bezonas internacian helplingvon; la dubo, ĉu eblas havi PEN-Centron teritorie ne difinitan.

Kiel vi respondis al tiuj ĉi demandoj?

Unue, ke Esperanta PEN-Centro naskiĝis en 1991; ĝi konsistas el dudeko da profesiaj verkistoj kaj ĵurnalistoj en Esperanto, kiuj subskribis la PEN-ĉarton; kio neniam okazis antaŭe. Due, ke tute ne temas pri akcepto de Esperanto kiel internacia helplingvo, sed pri agnosko pri la rajto utiliĝi Esperanton kiel transnacion kulturelingvon, por arta produktado. Tria, ke jam ekzistas precedencoj, en la jida kaj en la roma (gigana) PEN-Centroj.

Kiel reagis ĝenerale la asembleo al ĉi tiuj argumentoj?

Positive, evidente: 29 por 13 sindetene, nur 4 kontraŭ. Mi ŝatus emfazi, ke la raŭmismaj konceptoj estis pli klaraj por ili, ol por multaj esperantistoj mem, ĵi ja komprenis, ke Esperanto estas, pli ol movado por la propagando de filantropajo, unu sociala fenomeno, nome kvazaŭ diaspora lingva minoritato. Kaj ke ni estas parto de la intelektularo de ĉi tiu diasporo.

Ĉu Esperantlingva Verkista Asocio kunlaboris por tiu ĉi sukceso?

Ne. Esperanta PEN-Centro eĉ ricevis de EVA leteron, kiu "invitis" entrepreni nenion ĉe PEN Internacia. La sukceso ŝuldiĝas ekskluzive al la membroj de nia Centro, kiuj dum preskaŭ du jaroj laboris tiucele. Mi speciale dankas István Nemere, Judit Fej-szeghy kaj Perla Martinelli. Krome, mi dankas la kooperativon de Literatura Foiro, kiu donis financan subtenon.

En Valencio estis proponita la malfondo de EVA: kion vi opinias pri tio?

Tio estas demando, kiu koncernas la membrojn de EVA, kaj ne min. Mi ŝatus atentigi, ke nia Centro ne estas neŭtrala, ĉar ĝi aktive subtenas la principojn de la PEN-Carto. Krome, nia Centro estas libera kaj sendependa. EVA estas neŭtrala kaj aligita al UEA.

Kion entreprenos la Esperanta PEN-Centro dum la venontaj monatoj?

La mandato de la nuna estraro plenumiĝis per la akcepto flanke de PEN Internacia. Nia asembleo baldaŭ elektos novan estraron kaj aprobos laborplanon, kiu inkluzivos i.a. la aktivajn partoprenon en la strukturoj de PEN Internacia.

Ĉu, laŭ via opinio, ĉi tiu estas grava atingo por la agnosko pri la valoro de Esperanto?

Ĝi estas la plej grava atingo ĝis nun trafita por la agnosko pri Esperanto kiel literatura lingvo. La sekva paŝo estu la atingo de Nobel-premio pri literaturo fare de originala verkisto en nia transnacia lingvo... Ekde la 10-a de septembro 1993 neniu rajtas aserti, ke Esperanto ne havas literaturon aŭ kulturon.

Intervjuo de D-ro SILFER, Ĝenova el
"HEROLDO DE ESPERANTO" - Decembro 1993

Association
humanitaire

homcala
asocio

MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO

15 rue Victor Duruy, 75015 PARIS (Francio)

3 manieroj por partopreni (aldoneblaj) :

- [] **aboni** : 15 FF jare (4 numeroj), t.e. aparte partopreni en la financado de fabriko kaj de dissendo de la bulteno *MONDA SOLIDARECO*
 - [] eldono en Esperanto (Esperanto estas la oficiala lingvo de *MONDA FONDUSO*)
 - [] eldono en Franca lingvo
 - [] eldono en Hispana lingvo
- [] **donaci**

Minimume 85 % de via donaco iras al konkretaj agoj kontraŭ la malsato
Maksimume 15 % utilos por la administraj kaj informaj kostoj.
- [] **anigi**, tio estas :
 - * sin devontigi pagi kiel tutmondan solidarecon kontraŭ la malsato
 - * **jaran kotizon**, kies sumon oni **mem** taksas. (plenigu la ĉi-dorsan formulon)
 - * rajtiĝi plenumi la membrecajn rajtojn pri voĉdonado, pri proponado, pri kontrolado, ktp
 - * partopreni en universala asocio, kies 800 unuaj membroj, dis sur la kvin kontinentoj, estas interligitaj per sia deziro aŭ sia volo vidi iam juron anstataŭi bonkorecon.

Unu stadio : pasi de bonkoreco al reciproka interhelpo

unu celo : instigi la kreadon de vera *Tutmonda Institucio pri Solidareco*

Ni bezonas esti multnombraj. Ni bezonas el Ĉiu.

===== HELPO AL ESPERANTO-AGADO EN MALAGASIO =====

En rilato kun S-ro Hans Bakker, UEA-fakulo pri Esperanto en Afriko, nia federacio ricevis helpo-peton por Esperanto-agado en Malagasio. Aliflanke restis al ni ankoraŭ relative granda stoko da libroj siatempe donacitaj de S-ro A. Lienhardt, nome: "Lexique fundamental Esperanto-Français" "Manuel de Perfectionnement".

Lau rekomendo de Hans Bakker, ni tiam petis de Eugène Raveloson, respondeculo de UKS raporton pri la financoj de tiu organizo, kaj sendis ekzempleron de tiuj du libroj. Responde ni ricevis klaran analizon pri eventualaj bezonoj.

Dum nia ĝenerala asembleo okazinta la 13-an de junio, estis prezentita la helpo-peto de UKS. Sekve al tia analizo estis farita propono sendi ambaŭ librojn al la 49 adresoj de Esperanto-lerantoj, (ĉefe instruistoj kaj profesoroj), ricevitaj de UKS. Restis solvi la problemojn de la sendkostojn. Post diskutado la asembleo aprobis la decidon pri helpo al UKS je 1000 FF.


Jen kiel estis plenumita tiu decido:

Fine de junio, ĵus antaŭ la altiĝo de poŝtaj tarifoj, mi sukcesis forsendi 49 paketojn kun po 2 libretoj, afrankante ilin je 9,50 F. La tuta elspezo estis 9,50x49=465,50 F.

Post interkonsento kun Hans Bakker, ni rezignis pri sendo de kasedoj al tiuj lernantoj, almenaŭ en la nuna momento. Aliflanke en oktobro, mi ricevis de Eugène Raveloson peton por du stampiloj por UKS. Mi akceptis tiun peton, ĉar la konsentita monsumo ankoraŭ ne estas elĉerpita. Mi povis sendi per registrita letero la du stampilojn. La elspezo estis 187,40 FF por la stampiloj + 26,70 FF da registrita send-kosto. Entute la federacio elspezis 679,60 FF el la 1000 F deciditaj de la asembleo. Por eventuala sendo de kasedoj restas proksimume 300 FF.

Eugène Raveloson je la nomo de Universala Kultura Servo multe dankas nian federacion pro la ĝis nuna helpo por disvastigo de Esperanto en Malagasio, per sendo de libroj kaj stampiloj.

A. GROSSMANN



PERSONA MEMDEVONTIGO

MI, subskribant(in)o

FAMILIA NOMO _____ PERSONA NOMO _____

NASKIĜJARO _____ (la rajto voĉdoni validas je 16a-j)

PLENA ADRESO: _____

POŝTA KOĈO : _____ URBO : _____ LANDO: _____

deziras aliĝi al **MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO.**

Profite al la tutmonda solidareco kontraŭ la malsato, mi devontigas min pagi la minimuman(1) jaran sumon je _____

ekde tiu tago : _____

Ĉi enmetita(2), mia unua pago
je la nomo de **FMSCF-MONDA SOLIDARECO**
[Poŝtĉirkonto : CCP PARIS 10 734 96 Z]

subskribo,

(1) La minimuma jara kotizo egalvaloru unutagan nutraĵporcion.
Ĝi estas la bazo de egaleco inter ĉiuj membroj de MONDA FONDUSO.
Ne estas limo por iu "maksimuma" jara kotizo.

(2) Oni konsentas pri ĉia banka aŭ poŝta aŭ alia pagmaniero.

Pro niaj pasintjaraj sukcesoj, ni organizos dum la venonta somero internacian semajnon kiu okazos de la 3-a ĝis la 10-a de septembro 1994 ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo Sète, 30 km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro.

Ni proponas al vi lerni au perfektigi vian scipovon pri Esperanto. Ni havos diversnivelajn kursojn gvidatajn de eminentaj geinstruistoj inter kiuj S-ro Babin kaj S-ro Gubbeins.

Kiel ĉiujare vi trovos vere internacian etoson. Ankaŭ, banado, porpiedirantaj promenadoj, ekskursoj, vizitoj, kantado, interesaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo ĝojiĝos vin. Tre modesta restadokosto. La restadejo taŭgas por gerulseĝuloj. Eblas tendumi proksime.

Aliĝoj kaj informoj: Centre Culturel Esperanto de Montpellier

5 Rue du Docteur Roux, 34000 Montpellier (FRANCIO), Tel: 33 67 54 15 43

*** rapide... efficace ...



NOTRE COURS D'ESPERANTO
PAR CORRESPONDANCE



- ★ un matériel moderne
- ★ une technique éprouvée
- ★ un réseau d'animateurs compétents
- ★ un savoir immédiatement opérationnel

UNE ADRESSE



"Activité ESPERANTO"
MJC Ph. Desforges

27, Rue de la République
54000 NANCY

=====

UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

BULLETIN D'ADHESION 1/10/1993 - 30/09/1994

NOM et Prénom : _____
Adresse : _____

Sexe : Masculin Féminin Téléphone : _____


Date de naissance * : 19.../.../... Profession : _____
(si retraité: profession avant votre retraite)

* Indispensable pour bénéficier des avantages "jeunes".


	Prix FF	Member 1 (**)	Member 2 (*)	Code
I - COTISATIONS NATIONALES : pour s'informer et participer à l'action en FIANCE				
UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO (U.F.E.) Membre actif : carte de membre, abonnement à Franca Esperantisto et Esperanto Actualités. Participe à l'élection du comité de l'U.F.E.	270			FMA
Membres actifs couples : idem membre actif, deux cartes de membres, deux voix à l'élection du comité et un abonnement aux revues	410			PK1 PK2
Membre simple : carte de membre et 4 numéros d'Esperanto Actualités.	160			FSM
II - COTISATIONS INTERNATIONALES : pour une ouverture sur le mouvement mondial				
ASSOCIATION UNIVERSELLE D'ESPERANTO (U.E.A.) Membre avec l'annuaire	120			UNJ
Membre avec l'annuaire et abonnement à la revue ESPERANTO	300			UMA
Membre avec petit guide (1/3e partie de l'annuaire).	50			UMC

PAIEMENT

Chèque postal ou bancaire à l'ordre de U.F.E. à joindre OBLIGATOIREMENT avec ce bulletin d'adhésion à : U.F.E. 4 bis Rue de la Cerisaie 75001 PARIS



MONATA STATISTIKO PRI LA RICEVO DE ABONOJ por 1993



NIAJ STATISTIKOJ

En 1993 ni preskaŭ atingis nombron de 250 abonantoj (249). Ni tiel eĉ superis tiun de 1989 (248). Tre verŝajne ni ŝuldas tion al la sukcesa staĝo okazinta en Haguenau. Ĝi certe alportis novajn abonantojn. Sed aliflanke ni povas konstati malkreskon de nia membraro, kiu sinkis de 193 en 1992 al 156 en 1993. Ĝi estas la plej malalta en la lastaj 6 jaroj. Kio estas la kaŭzo de tiu fenomeno? Ĉiuj kategorioj preskaŭ sam-proporcie malkreskis. Tial mi nur povas rekomendi al vi: Kiam vi pagas vian abonon por La Informilo ne forgesu paĝi samtempe vian federacian kotizon aŭ aparte al UFE vian UFE/UEA-kotizon.

Vous venez de recevoir, pour l'année 1993, votre dernier bulletin d'information sur l'Espéranto, **LA INFORMILO**. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement (4 numéros par an) pour 1994. A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1994 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'UFE et à l'UEA, (catégorie 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 1993 de l'UFE, sinon celui que vous trouverez dans ce numéro. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88. Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Fédération, mais jamais à l'UFE.
- 2/ La cotisation à la FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
 - = de préférence par virement postal à FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
CCP 1997 72W NANCY (pratique et sans frais)
 - = par chèque bancaire à l'ordre de cette même fédération, mais adressé à notre trésorier:
S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
 - = Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du Groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (20 F), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisation de l'UFE.

Cat. TABLEAU DES COTISATIONS 1994

- 1 = **abonnement simple à La INFORMILO**
- 2 = **adhésion simple à la FÉDÉRATION CULT. DE L'EST**
 - * *membre fédéral avec abonnement à La INFORMILO*
 - * *membre fédéral sans abonnement à La INFORMILO pour les autres membres de la famille par exemple*
- 3 = **adhésion à la FÉDÉRATION et à l'U.F.E.**
 - * *membre simple*
 - * *membre actif JEFO moins de 30 ans au 01.10.93*
 - * *membre actif JEFO Etudiant, chômeur, scolaire, militaire*
 - * *membre actif UFE avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO"*
 - * *membre actif UFE conjoint*
- 4 = **adhésion à la FÉDÉRATION + U.F.E. + U.E.A.**
 - * *membre individuel reçoit "F.E°" + guide de l'UEA*
 - * *membre individuel reçoit "F.E°" + annuaire de UEA + (revue KONTAKTO, si moins de 30 ans)*
 - * *membre individuel reçoit "F.E°" + annuaire de UEA + revue mensuelle ESPERANTO + (KONTAKTO, si moins de 30 ans)*

cotis.	abonnem. Informilo 50 F
27 F	+ 50 F
27 F	
160 F	+ 50 F
150 F	+ 50 F
90 F	+ 50 F
270 F	+ 50 F
140 F	
320 F	+ 50 F
390 F	+ 50 F
570 F	+ 50 F

IMPORTANT

- 1 - Les nouveaux adhérents recevront par courrier séparé leur(s) carte(s) de membre à la Fédération, à l'UFE, à l'UEA, selon les cotisations payées ainsi qu'un exemplaire des status de notre Fédération.
- 2 - Les autres membres trouveront dans le bulletin La Informilo, qui suit l'enregistrement de leurs cotisations, les coupons de l'année 1994, à coller sur les cartes de membre respectives. Les membres de l'UEA y trouveront également les coupons 1994 donnant droit au service des délégués mondiaux dont les adresses se trouvent dans l'annuaire de l'UEA.
- 3 - Les membres de l'Enseignement, payant leur cotisation de l'UFE, sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES GEE.
- 4 - Les jeunes de moins de 30 ans au 01.10.93, payant leur cotisation de l'UFE ou de JEFO, voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANÇAISE JEFO et recevront alors en plus la revue *Koncize* et le bulletin interne national JEFO *informas*. Ils auront droit de vote au Comité de JEFO.

Jen vi havas inter viaj manoj la lastan numeron de La Informilo por 1993, per ĝi, finiĝas via abono por ĉi-jaro. Tre verŝajne vi ŝatas ĝian enhavon, kaj grave taksas la klopodojn faritajn por ĝia eldonado. Certe vi daŭre deziras ricevi ĝin, ankaŭ en 1994. Jen alvenis la momento por pagi vian jar-abonon al La Informilo por 1994. Bonvolu fari tion senprokraste, vi tiel faciligos la laboron de nia kasisto, kaj forigos la riskon ne regule ricevi ĝin.

Vi atentu, ke via kotizo pagita al UFE neniam entenas la abonon al La Informilo. Sed vi iĝas aŭtomate membro de nia federacio, se vi loĝas sur la federacia teritorio (departementoj 54 55 57 67 68 86) aŭ en apudaj landlignaj regionoj. Se via adreso estas ekster tiuj regionoj, aŭ se vi ne intencas aliĝi al UFE, bonvolu sam-okaze pagi vian federacian kotizon je 27 FF por iĝi aŭ resti federacia membro. Profitu tiun okazon por menci vian eventualan adres-ŝanĝon aŭ vian novan poŝtkodon (por niaj germanaj abonantoj).

Aparte vi trovos la tarifojn de la UFE/UEA-kotizoj, kiujn vi bonvolu rekte pagi al UFE helpe de la aliĝilo, kiun ricevis ĉiuj ĉi-jaraj membroj. Sed vi neniam pagu la abonon al La Informilo al UFE. Tio estus perdita mono, kaj postulus vanan intersanĝon de leteroj.

	Jaroj:	1994	1995	1996
Abono al La Informilo por enlandaj adresoj		50 FF	50 FF	50 FF
Abono al La Informilo por eksterlando			20 Rpk aŭ	74 FF
Federacia kotizo		27 FF	28 FF	29 FF
Bankkostoj, por pagoj per eksterlanda bankĉeko			20 FF	

Bonvolu ĝiri la koncernan sumon al la poŝtĉekkonto de nia Federacio:
 FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO PÊK 1997 72W NANCY
 Aŭ rekte per bankĉeko al mia adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des
 Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

LA KOMPUTORO MEMORAS

Vi povis konstati, ke en lastaj jaroj mi ofte proponis pagon de abonoj al La Informilo por unu, du aŭ eĉ tri jaroj. Pluraj favore respondas al tiu propono, pagante por pli ol unu jaro. Mia komputoro bone memoras pri tiuj diversaj pagoj sed la pagintoj kelkfoje forgesas pri siaj antaŭaj propraj pagoj. Ekde ĉi-tiu numero la unua linio sur la etikedo antaŭ la adreso mencias ne nur la pagon de la koncerna jaro, sed ankaŭ la eventualan pagon de la sekvanta jaro. Ekz.

44 93-A UFE MA 94-A.

Tio signifas, ke abono por 1994 estas jam pagita. Bone kontrolu vian etikedon. Se la unua linio ne mencias 94-A, tiam senprokraste bonvolu pagi vian abonon por 1994 kaj eventuale eĉ por 1995 kaj 1996. Dankon!

Via kasisto: A. Grossmann

FE ABONOJ

Peradas por vi UFE, 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS, Telekopiilo + (33) 1 42 78 08 47.	Fonto (Literatura revuo) (12 numeroj) 120	Lā Ondo de Esperanto (6 numeroj) (socikultura el Ruslando) 60
	Franca Esperantisto (11 numeroj) (por NE aktivaj membroj de UFE) 180	Lingvaj Problemoj Lingvo Planado (3 numeroj, po 100 paĝoj) 190
	Heroldo de Esperanto (16 numeroj) (gazeto de la Esperanto-movado) 144	Literatura Foiro (6 numeroj) 165
Abonoj validas por la kalendar jaro krom por El Popola Ĉinio, kies abono povas komenci en iu ajn monato.	Heroldo (aerpoŝte, konsilinde) 169	Literaturaj numeroj de Franca Esperantisto (3 numeroj) 80
	Juna Amiko (Interlemeja revuo) (4 numeroj po 32 paĝoj) unu ekzemplero 45	Litova Stelo (6 numeroj) 60
	de 2 ĝis 5 ekzempleroj je la sama adreso 40	Monato (12 numeroj) (Internacia magazino) 210
	de 6 ĝis 24 ekzempleroj je la sama adreso 30	Monato (aerpoŝte) 245
	ekde 25 ekzempleroj je la sama adreso 25	La Jaro (poŝkalendaro de Monato) 30
	Kontakto (6 numeroj) (por NE TEJO-membroj - facila lingvaĵo) 125	La Jaro (aerpoŝte) 42
	ekde 10 ekzempleroj senditaj al unuopaj ricevantoj 100	Norda Prismo (4 numeroj) (Kultura revuo pri Nordio) 75
	senditaj al sama adreso 75	Rok' Gazet' (pri muziko) (2 numeroj jare) Abono por 4 numeroj 100
Brita Esperantisto (6 numeroj) 120	Kulturaj Kajeroj (Grésillon) (4 numeroj) 80	Ruslanda Esperantisto (12 numeroj) 48
Ekumenismo (4 numeroj) 60	La Espero el Koreio (6 numeroj) 82	Spekto (4 numeroj) (Internacia revuo pri Esperanto) 38
El Popola Ĉinio (12 numeroj) 150	La Kancerkliniko (5 numeroj) (politika, kultura, ajnista) 125	Verda Lupeo / Fenikso (4 numeroj) 90
Esperanto (11 numeroj) (por NE membro-abonantoj de UEA) 190		
Esperanto-Actualités (en français) pour 5 ans 190		
Esperanto-dokumentoj (en la angla, aŭ esperanta aŭ franca) 150		
Eventoj (24 numeroj) (pri la Esperanto-movado) 205		
Eventoj (aerpoŝte) 235		

La Gazeto - 145F (6 n°j) Pagenda rekte al:
 "La Gazeto" F-55210 CREÛE PĈK 1025 02 T NANCY

Aboni geamikojn el nepagipovaj landoj eblas pere de UFE.

POUR UN ESPERANTISTE
LA "JOURNEE DU LIVRE"
DURE TOUTE L'ANNEE!

el nia libro-servo de notre "livre-service"

JARFINAJ AŬ NOVJARAJ DONACOJ...

Ĉu floroj? Ĉu poŝtkartoj? Ĉu alkoholaĵoj? Ĉu... Kial ne libroj, ES-
PERANTO-LIBROJ?...

Ili estas diversaj laŭ la nombro, la aspekto, la enhavo, la stilo. Estas li-
broj por infanoj, junuloj, plenkreskuloj, kuirist(in)oj, spertuloj, kadukuloj,
senbrakuloj, sen... (ni ne diru pri kio temas, ĉiu kapablas sin rekoni aŭ rekoni
la donac-ricevonton).

Kelkajn titolojn ni povas indiki al vi, amikaj klientoj de ĉiam aŭ de hodiaŭ!

= Por knaboj

"Emilo de Smolando", elsvedigita kaj plie perfekte prezentita de "Progreso El-
donejo", kiu ankaŭ eldonis la "Plupo-serion", kies titoloj estas "Plupo kaj la
gruoj", "...kaj la maro", "...kaj la lupoj", "...kaj la grandarbaro", "...kaj la
ursidoj". "Emilo..." kostas 40FF, kaj la "Plupo-j" 53FF.

= Por plenkreskuloj

El la eldonejo "Pro Esperanto" ĉi-jare aperis:

1/ "La dormanta grafino", de Ivan G. Ŝirjaev. Temas pri originalaj noveloj
skribitaj de rusa verkisto, kiu lernis Esperanton jam en 1895. Tiuj noveloj estas
interesaj pro pluraj kialoj: ili estas skribitaj en perfekta lingvo, rakontas pri
la vivo en Rusio antaŭ la 1917-a revolucio; plie ili estas mallongaj kaj povas
utili por kluboj, duagradaj kursoj. Prezo: 100FF.

2/ "La nova vivo", romano el la sama Ŝirjaev. La rakontajo estas klara kaj
unu-linia sen epizodaj deflankiĝoj; ĝi pentras la vivon de simplaj homoj en la
malnova Rusujo antaŭrevolucia per realisma prezento. Ke la fino de la rakonto,
t.e. la transpaŝo de sociaj hierarkioj, impresas -speciale antaŭ la fono de la veraj
sociaj okazintaĵoj- iom fabeleca, ne povas forigi la preskaŭ dokumentecan karak-
teron de la romaneto: kiel ĉiuj verkoj de Ŝirjaev ĝi kondukas nin en mondon jam
delonge pereintan. Prezo: 64FF.

3/ "Poemo de Utnoa", originala epopeo de Abel Montagut. Temas pri fantascienco.
William Auld, kiu prezentas la libron, skribas... "Ŝajnas al mi, ke Poemo de Ut-
noa" estas la unua vere atendinda fantascienca epopeo en la mondo, kaj unu el tre
malmultaj modernaj epopeoj. Mi nomis ĝin unika, kaj tia ĝi estas". Tiuj vortoj
diritaj de la aŭtoro de "La infana raso" -poemo el 25 ĉapitroj- sufiĉas, miaopi-
nie, por rekomendi tiun libron al la poezi-ŝatantoj. 226 paĝoj. Prezo: 145FF.

El la jugoslava eldonejo "Terezia Kapista", nova libro de Tibor Sekelj, "Temu-
ĝin, la filo de la stepo". Temas pri noveloj skribitaj dum junaĝo. La libro 68-
paĝa kostas nur 26FF.

Kaj se vi deziras pliajn informojn, konsilojn, turnu vin ĉu al viaj libroser-
vistoj, ĉu al la katalogo.

Roger DEGRELLE

KONSTANTA MENDO

Vi povas **konstante** mendi ĉiujn novaperintajn librojn disponeblajn en nia libro-
servo. Vi ricevos **5%** da rabato kaj la libroj estos **tuj** je via dispono.

Se tiu sistemo plaĉas al vi, bonvolu resendi la ĉi-suban "konstantan" mendilon
al

LIBROSERVO

12, Rue E. d'Orves

54490 PIENNES



S-ro S-ino F-ino _____

Adreso _____

konstante mendas 1/ Ĉiujn librojn novaperintajn 2/ Ĉiujn romanojn
kaj novelo-librojn...
(bonvolu krucumi en la 21 ... originale verkitajn en Esperanto
necesaj kvadratoj) 22 ... tradukitajn



distra angelo



JARFINA KONKURSO: La 2 proponataj "enigmoj", korekte solvitaj de interesatoj, ebligos al 2 el ili (unu enlanda, unu eksterlanda) ricevi donace E^o-libron, post lotumado inter la ricevitaĵoj solvoj. Ili atingu nin nepre antaŭ la 1a de februaro 1993 (adreso de la redakcio).

1 = KRUCVORT-ENIGMO (verkis Marĉek)


HORIZONTALA

A - Loĝanto de Arabujo - fleksigema, adaptebla /rad./, B - Tropika frukto - unuopaj, izolitaj, C - Granda tropika herbo, kiu post la florado mortas - metaforo, stila figuro - kardiaĵo, Ĉ - Sekse ami - trapiki per beko - sidas sur ovoj, D - Partoj de nazo - ceremonia reĝa seĝ' - valora pro malofteco - faritaj el oro, E - Produktoj de kokino - voĉe komuniki - apartenanta al ĝi - nomo de ne-Esperanta litero - rilata al grasa likvaĵo, F - La kvina monat' - unuo de la laboro en la CGS-sistemo - fleksitaĵo, sulko /ekz. sur papero/ - malfrida /rad./ - fungo-ĉel', G - LA KAŜITA PROVERBO, G - Monatoj - ne suferanta pro malsano - refleksiva poseda adjekto /plurale/ - forĝista fera bloko.

VERTIKALA

1 - Mezurunuoj de el. rezistanco, 2 - Estu monavida, 3 - Faritan el kunfanditaj metaloj, 4 - Fortaj korinklinoj - insekse persona pronomo, 5 - Faroj - speco de angla biero, 6 - Membrar' doktoroj /ml./, 7 - Veki admiron - Internacia Gazetara Servo, 8 - Membro - transpasis la mezuron, 9 - Kemia simbolo de bario - numeralo - difina artikolo, 10 - Manglebla mara molusko - baza kolor', malantaŭaĵ', 11 - Havanta malbonkvalitan oranĝan koloron /neuzata/, 12 - Siberia river' - persona pronomo, 13 - Montrados sin, 14 - Rilata al grava jararo - persona nedif. pronomo, 15 - Landa Asocio - paŝi - Membro-Abonanto, 16 - Part' de cirklo - rilataj al la plej konata fluidaĵo, 17 - Kvant' da varoj, kiuj estas dispone - natria klorid', 18 - Pezo de pakmaterialo - perdinta la gepatrojn, 19 - Indonezia insulo - Mondpaca E-ista Movado, 20 - Dek du monatoj - kemia simbolo de rubidio, 21 - Dika kolbaso, 22 - Esprimas konsenton, 23 - Imaga linio, laŭ kiu la objekto estas simetria.

HELPILOJ: C - Tropo, F - Ergo - ask, 5 - Elo.



SOLVOJ de la lastaj "enigmoj".

Krucvort-enigmo: kaŝita proverbo:
*Parolo estas arĝento.
Oron similas silento.*

"Silab"-enigmo:
Veniu estas profeto en sia urbet

Charade "à tiroirs": KAMELO

Mon 1er c'est **Ka**
parce que **Ka** fait... "ollé!"
Mon 2ème c'est **mé**
parce que **mé** a ri...
mon 3ème c'est lo parce que lo bue éclate...

2 = SILAB-ENIGMO

Helpe de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon (Zf).

ar aro be de de di do do en er es fo ĝar ib io is ke ke lan le lo lo mo ni ni no no nor of po pu sa so ti ti to tra tu um unk var ver vun

1	+ - - + -	havenkonstruaĵo
2	+ - - + - -	antaŭa Hispanio
3	+ - - + - - - -	burleskulo
4	+ - - + -	difinita modelo
5	+ - - + - - -	organismo-difekto
6	+ - - + - - -	insulo
7	+ - - + - - -	objekto ŝmirajo
8	+ - - + - -	malrespekti dignon
9	+ - - + - -	atomnumero 28
10	+ - - + - - -	kulturita terpeco
11	+ - - + - -	centripeta infloresko
12	+ - - + -	sanktolei
13	+ - - + - - -	voluptema despoto
14	+ - - + - - -	riverelfluejo
15	+ - - + - - - -	parlamentano

RIDO SANIGAS!... _____

Iu turisto luprenas kamelon por iom ekskursi en la dezerto. La kamelludonanto instruas al li, ke la besto ekiras aŭdante la ordonon "uf!" kaj tuj haltas aŭdante "amen!". Neatendite la kamelo ekgalopas freneze... Vidiĝas tute proksime profunda ravino... kaj panikas la turisto, kiu sekve tute forgesas la efikan ordonon. Senesperigite li okulas ĉielen kaj laŭte diras "amen!". La kamelo tuj haltas kelkcentimetre de la ravinrando... kaj ĝojkvietigita la turisto profunde enspiras kaj ekrias... "Uf!".

(klarigoj por la ne-ridetantoj kuŝos en la venonta bulteno)